

Kio okazas al nukleaj centraloj? (2)

La 26an de oktobro 2018

La reaktoro n-ro 1 de Onagaŭa estos forĵetita

La 25an de oktobro 2018 la elektra kompanio Toohoku publikigis, ke la reaktoro n-ro 1 de Onagaŭa estos forĵetita. Tiu ĉi estas la 20a reaktoro forĵetita/ota post la Japana Katastrofo de 2011.

En la nuklea centralo Onagaŭa estas 3 reaktoroj. La



n-ro 1 ekfunkciis en 1984, nun 34-jara kaj la plej malnova el tiuj tri. Post la Katastrofo la registaro decidis novan regularon por pli sekure teni reaktorojn, kaj por adaptigi tiun ĉi reaktoron al tiu regularo, la kompanio bezonos pli ol 100 miliardojn da enoj (1 miliardon da eŭroj), sekve ĝi antaŭvidis, ke ĝi ne profitos.

Por forĵeti reaktoron, oni jene laboros por la venontaj 40 jaroj:

- 1) elpreni nukleajn brulaĵojn
- 2) malkonstrui instalaĵojn ĉirkaŭ la reaktordomo
- 3) malkonstrui reaktoron
- 4) malkonstrui reaktordomon

Tamen TEPCO kaj la registaro ne scias, kie ĝi povos konservi tiujn fortege radioaktivajn brulaĵojn. En tiu senco la reaktoro estos neniam finforĵetita.


Nuklea centralo Tookai n-ro 2 estis aprobita

La 7an de novembro 2018 Nuklea Reguligada Aŭtoritato aprobis, ke Japana atomenergia kompanio (angle The Japan Atomic Power Company) povu funkciigi sian reaktoron dum la venontaj 20 jaroj. La rolo de Aŭtoritato devas esti restrikti aŭ malpermesi nukleajn reaktorojn laŭ leĝoj, sed en efektiveco ĝi aprobadis refunkciigon de pli kaj pli multe da reaktoroj.

Ĉi-foja aprobo de Tookai n-ro 2 havas precipe grandajn problemojn. Unue tiu reaktoro estas jam 40-jara kaj kaduka. Eĉ se la kompanio sukcesis ripari tiun maljunan reaktoron laŭ la regularo, ĝi ne povos perfekte novigi ĝin. Kio okazos al ĝi dum la venontaj 20 jaroj,

neniu scias.

Due en la radiuso de 30 kilometroj de la reaktoro loĝas 960 mil homoj. La koncernaj komunumoj devas havi evakplanon por tiuj loĝantoj, sed tio ne eblos. Por



evakui ilin, 3000 busoj estos necesaj. Ne estos sufiĉaj urboj, kiuj akceptos ilin. En tiu zono loĝas multaj maljunuloj kaj handikapitoj. Estos ne eble transporti tiujn homojn. Krome Tokio situas nur 100 kilometrojn for de la

centralo. Se okazos grava akcidento kiel tiu en Fukuŝima kaj ventoj enhavantaj radioaktivaĵojn flugos al Tokio, ĉiuj tokio-anoj (10 milionoj) devos rifuĝi. Sed kiel tiom multe da homoj povos rifuĝi? Kien ili iru? Certe la funkcio de la ŝtato perdiĝos kaj Japanio mem malaperos.

Aŭtoritato ekzamenas nur la maŝinaron. Ĝi nenion mencias evakplanon, ĉar ĝi ne havas rajton pri tio. La registaro, kiu volas funkciigi plej multajn reaktorojn, silentas, bonvenigante la aprobon de Aŭtoritato. Por mi Aŭtoritato kaj la registaro estas stultaj, frenezaj kaj senrespondecaj, ĉar la aprobo riskos la vivon de la japanoj kaj la ekziston de Japanio.

Estas malpermesite konstrui nukleajn centralojn en la lokoj dense priloĝataj. Eble kiam tiu centralo Tookai estis konstruita, ne multaj homoj loĝis ĉirkaŭ ĝi, sed nun 960 mil homoj loĝas. Ses komunumoj ĉirkaŭ ĝi havas rajton

aprobi aŭ ne la refunkciadon. Kutime la urboj, en kiuj staras nuklea centralo, aprobas kaj bonvenigas la refunkciigon, ĉar tiuj urboj multe dependas de la mono el la centraloj, sed tiuj ses ne multe dependas kaj la loĝantoj forte kontraŭas la refunkciadon, do estos malfacile por la elektra kompanio ricevi aprobon de ĉiuj 6 komunumoj, tamen oni ne scias, kio okazos, ĉar la kompanio uzos monon por subaĉeti kaj la registaro uzos potencon por minaci. Ni devas batali kontraŭ tiuj malicaj intrigoj kaj kuraĝigi tiujn ses komunumojn por ke ili ne akceptu la proponon de la refunkciigo.

Elektra kompanio Kjuuŝuu rifuzis recikligan elektron

La elektra kompanio Kjuuŝuu rifuzis ricevi recikligan elektron la 13an, la 14an, la 20an, la 21an de oktobro kaj la 3an kaj la 4an de novembro.

En la regiono Kjuuŝuu estas multaj sunaj tagoj, do troviĝas tre bona kondiĉo por recikliga elektro. En majo 2018 la produktokvanto per sunenergio superis 8 milionojn da vatoj.

Tio superas 50% de la bezonata kvanto da elektro en Kjuuŝuu kaj la 3an de majo la produktita kvanto per sunenergio atingis 81%. Tio estis la rekordo en Japanio.



Inter majo kaj septembro la elektra kompanio Kjuuŝuu funkciigis kvar nukleajn reaktorojn (la produktokvanto estas entute 4,1 milionoj da vatoj), tial en oktobro kaj novembro superfluis elektro.

Laŭ la regularo de la ministerio de ekonomio kaj industrio la kompano devas ĝustigi la produktokvanton por eviti elektran paneon. En tiu okazo la kompano devas unue redukti elektron produktitan per sunenergia kaj ventenergia, kaj fine elektron per nuklea energio. Laŭ tiu regularo la kompano reduktis 0,93 milionojn da elektro el sunenergia. Tiun elektron la kompano mem ne produktas, sed aĉetas el privataj entreprenoj. Eĉ kiam ĝi rifuzas ricevi tiun elektron, ĝi ne kompensas la perdon al tiuj entreprenoj.

La registaro ŝajne promesas antaŭenigon de recikliga energio, sed en efektiveco ĝi ne volas tion. Tio estas grava afero ne nur por tiuj sunenergiaj entreprenoj, sed ankaŭ por mi. Post la Japana Katastrofo mi aĉetis sunpanelojn kaj produktas elektron sur la tegmento de mia domo en



mia kompanio “Espero”. Same multaj aĉetis sunpanelojn kaj produktas elektron, volante, ke ni pli dependu de sunenergia, sed ne de nuklea energio. La

decido de la elektra kompanio Kjuuŝuu celas bremsi

movon por recikliga energio. Multaj postulas, ke la elektra kompanioj unue reduktu elektron produktitan per nukleaĵoj. Ni devas ŝanĝi tiun politikon pri nuklea energio.

Problemo de tricio en Fukuŝima

La nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima ankoraŭ suferas pro poluita akvo. Ĉiun tagon subtera akvo enfluas sub la difektitajn reaktorojn, miksiĝas kun poluita akvo kaj radioaktiviĝas. La elektra kompanio Tokio (TEPCO) konstruis glaciigitan termuron ĉirkaŭ la reaktoroj por bari la enfluadon, sed ĝi ne multe sukcesis. Tial ĝi ĉiam elpumpas tiun akvon kaj ĝis nun konservas 940 mil tunojn da akvo en grandaj akvujoj. Poste ĝi purigas ĝin per maŝino nomata ALPS kaj suĉigas ĉiujn 62 nukleaĵojn krom tricio al specialaj filtriloj.



En 2017, 1000 akvujoj

Kion fari pri tiu akvo enhavanta tricion? Ankaŭ tricicio estas nukleaĵo, do la kompanio ne povas forĵeti la akvon libere en la maron. Dum la pasintaj 7 jaroj TEPCO konservadis tiun akvon en sia tereno. Antaŭe la tereno de la centralo estis plena de verdaĵoj, sed nun estas preskaŭ okupitaj de tiuj akvujoj. Certe baldaŭ mankos lokoj.

Por solvi tiun problemon estas 5 elektoj, kaj el ili, TEPCO volas kaj Nuklea Reguligada Aŭtoritato proponas, ke TEPCO forĵetu ĝin en la maron, ĉar tricicio estas nukleaĵo, sed simila al akvo, do ili opinias, ke la forĵetado ne gravas por la medio.

Tamen la 29an de septembro TEPCO publikigis, ke en tiu akvo ankoraŭ restas nukleaĵoj kiel stroncio kaj aliaj 20000-oble pli fortaj ol la normo. Laŭ la klarigo 75 tunoj el 94 tunoj da konservata akvo enhavas tiujn nukleaĵojn. Ĝis nun ĉiuj diskutis pri la problemo surbaze de tio, ke la konservata akvo nur enhavas tricion. TEPCO mensogis kaj kaŝis la fakton.

TEPCO diras, ke ĝi denove purigos la akvon per ALPS. Por tio oni bezonos multe da tempo. Dume la tereno de la nuklea centralo de Fukuŝima certe pleniĝos de la akvujoj. La fukuŝima-problemoj tute ne soliviĝis. Por kaŝi tion, la registaro propagandas la Tokio-Olimpikojn. La registaro okazigos matĉojn de softbalo por flati la fukuŝima-anojn, sed ili ne estas trompitaĵoj.